Jarraporto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA) por 2009

Estraro de NZEA

La jenaj anoj de la Estraro elektiĝis dum la jarkunveno en Sidnejo la 18-an de januaro de 2009, kaj daŭris kiel estraranoj dum la tuta jaro.

Prezidanto	David Ryan
Vic-Prezidanto	Chris Krägeloh
Kasisto	Don Rogers
Sekretario	Bradley McDonald
Helpsekretario	Howard Gravatt
Estrarano	Erin McGifford

La Estraro kunvenis kvar foje per telefono kaj ofte korespondis per retpoŝto pri aliaj aferoj.

Membraro de NZEA

Je la fino de la financa jaro (30 de septembro de 2009) NZEA havis 48 membrojn, el kiuj 14 estis novaj membroj, kompare kun 37 samtempe en 2008 kaj 41 en 2007.

Kluboj aktivis dum la jaro en Auckland, Masterton, Wellington, kaj Christchurch.

Dum la somera kursaro de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) en Sidnejo okazis la 2009-a jarkunveno de NZEA kiun ĉeestis 10 membroj.

Komunikado kaj propagandado

Retpaĝaro de NZEA

Don Rogers daŭre ĝisdatigis la retpaĝaron de NZEA (www.esperanto.org.nz) kaj ankaŭ renovigis la aspekton de la paĝaro. Nia retpaĝaro estas grava komunikilo kaj ni ofte ricevas informpetojn per la retadreso kiu aperas sur la retpaĝaro.

Arĝenta Filiko

Arĝenta Filiko, kiun redaktis Chris Krägeloh, eldoniĝis dufoje dum la jaro. *Arĝenta Filiko* estas alt-kvalita eldonaĵo kaj grava komunikilo al niaj membroj, krom la pli ĝeneralaj artikoloj en *Esperanto sub la Suda Kruco*.

Esperanto sub la Suda Kruco (ESK)

ESK dissendiĝis al membroj de NZEA kaj AEA. La formato kaj aspekto restis tre belaj kaj okulfrapaj kaj ESK enhavis kelkajn artikolojn el nov-zelandaj verkintoj. Tamen, estas necesa pli ofta kontribuo de artikoloj el Nov-Zelando.

Intervjuo en televido
David Ryan intervjuiĝis dum 25-minuta programo en la Triangle/Stratos televidkanalo en Auckland kaj Wellington en septembro de 2009. La intervjuo estis favora pri Esperanto.

Ekspozicio por instruistoj de fremdaj lingvoj

Gwenda Sutton, Don Rogers, kaj David Ryan starigis ekspozicion pri Esperanto en septembro de 2009 dum unu-taga kunveno de instruistoj de fremdaj lingvoj en Lower Hutt. La ekspozicio montris librojn, gazetojn, kaj faldfoliojn, sed ne estis granda intereso inter la proksimume 50 instruistoj.

Artikolo en tagĵurnalo

La 14-an de marto de 2009, aperis tri-paĝa artikolo verkita de ĵurnalistino Shelley Bridgeman en la revuo *Canvas*, kiu formas parton de la tagĵurnalo *Weekend Herald*. La artikolo estis ĝenerale favora pri Esperanto kaj en ĝi aperis fotoj de David Ryan kun filinoj, Vicky Crickett kiu legis libron al sia filo, kaj juna membro, Rouan van Ryn. La artikolo utilis kiel granda senpaga reklamo pri Esperanto kaj centmiloj da nov-zelandanoj verŝajne vidis ĝin.

Poste, sekvis normala kvanto da pertelefonaj kaj retpoŝtaj informpetoj; alivorte, ne ekis grandskala kresko en intereso pri Esperanto kiel rezulto de la artikolo.

Reklamado en gazetoj

NZEA mendis reklamojn en la revuo de Grey Power, kio donis kiel rezulton regulan fluon de pertelefonaj kaj retpoŝtaj informpetoj. Al personoj kiuj petis informojn ni sendis revuojn, librojn, gvidlibreton pri uzoj de Esperanto, kaj membroaliĝilon kun speciala oferto (senpaga revuo) por novaj membroj.

NZEA ankaŭ mendis reklamon en *The Listener*. Tamen, tiu reklamo ŝajne ne kaŭzis grandan intereson.

Vendoj per TradeMe

David Ryan vendis diversajn librojn en la retpaĝaro TradeMe, plejparte al personoj kiuj lernis Esperanton kiel junuloj kaj kiuj volis relerni ĝin.

0800 senpaga telefonnumero kaj retadreso

Nia senpaga 0800 numero (kiu aperas en nia retpaĝo) daŭre ekredirektiĝis al la domo de la Prezidanto. Samtempe, nia retadreso nzea@esperanto.org.nz daŭre vojigis mesaĝojn al la Prezidanto kaj Kasisto. Ĉi tiuj du komunikaj metodoj estas utilaj por ne-membroj kaj aliaj personoj kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj dum la jaro ni ricevis diversajn informpetojn.

Stoko de rimedoj

NZEA aĉetis 50 ekzemplerojn de la altkvalita DVD 'Esperanto estas'. Ĉi tiu DVD restos utila kaj freŝa dum multaj jaroj kaj povas esti vendata aŭ donacata al personoj kiuj montras veran intereson pri Esperanto. Ni sendis ekzemplerojn al la kluboj en Christchurch, Wellington, kaj Auckland.

NZEA havas stokon de libroj kaj revuoj kiujn ni povas sendi responde al informpetoj.

Financaj aferoj

Nia financa rezulto por la jaro estis sufiĉe plaĉa kun pli da enspezoj ol elspezoj, plejparte dank'al nia investenspezo. Bonvole vidu la apartan raporton de la kasisto.

UNANZ

NZEA restis kiel membro de UNANZ (Asocio de Unuiĝintaj Nacioj de Nov-Zelando). Bradley McDonald restis kiel reprezentanto de aliĝinta membro en la nacia estraro de UNANZ. En Auckland, Bradley organizis ekspozicion pri Esperanto kadre de UNANZ-evento.

Aperis artikolo verkita de NZEA en la aprila eldono de *UNANZ News*.

Premio 'Duke of Edinburgh's Hillary Award'

Gwenda ĝisdatigis la kurspriskribon por la Premio 'Duke of Edinburgh's Hillary Award' (antaŭe 'Duke of Edinburgh Award'). Eblas studi Esperanton kiel temon en la sekcio pri lertoj je la bronza, arĝenta kaj ora niveloj.

Internaciaj rilatoj

Bradley McDonald kaj Chris Krägeloh ĉeestis la Universalan Kongreson de UEA en Pollando en julio de 2009. Chris salutis nome de Nov-Zelando en la malferma ceremonio.

Kelkaj eksterlandaj Esperantistoj vizitis Nov-Zelandon dum la jaro. David Ryan vizitis Argentinon kaj Brazilion kie li renkontis lokajn Esperantistojn.

Nia rilato kun AEA restis bona, kiel ĉiam, kaj estis eĉ pli forta dank'al ĉeesto de sufiĉe multaj nov-zelandanoj en la somera kursaro en Sidnejo en frua 2009. Dum la jaro, NZEA kaj AEA restis en kontakto pri la somera kursaro kaj aliaj aferoj rilataj al ESK.

Ĝenerala konkludo

Bona novaĵo por la jaro estis kresko de nia membraro. Tamen, ni ankoraŭ havas nemultajn membrojn kaj, kvankam nia reklamado kaj okulfrapa artikolo en la revuo *Canvas*, nia membraro kreskis sed ne ege. Feliĉe, tamen, ni ricevis regulan fluon de informpetoj, plejparte post apero de niaj reklamoj en la revuo de Grey Power. Tiu reklamado ŝajnas esti nia plej efika reklammetodo dum lastaj jaroj.

NZEA ankoraŭ viglas, kiel la plejmulto de aliaj asocioj tra la mondo. Ni devas memori ke Esperanto ankoraŭ postvivas en Nov-Zelando post tiom da jaroj. Tamen, ni devas strebi eĉ pli en venontaj jaroj por pli vaste konigi Esperanton kaj por ke tiu kono iĝu kompreno pri Esperanto kaj poste membreco en NZEA kaj/aŭ personoj kiuj sendepende lernas Esperanton. Bonsanĉe, ni havas sufiĉan monon por tiu tasko, sed ni devas pensi pri pli freŝaj ideoj kaj ni bezonas pli da voluntuloj por helpi en nia eduka kaj informa agado.

Mi volas danki al la estraranoj de NZEA kaj al multaj aliaj membroj kiuj helpis diversmaniere dum la jaro. Ni ĉiuj estas tre okupataj en nia ĉiutaga vivo, sed ni sukcesas doni iom da nia tempo por aferoj pri Esperanto.

David Ryan
Prezidanto